FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

STIFTUNG BSW

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2004



Elrigardo de sur la pinto de la altforno en la "Landschaftspark Nord" en Duisburg
(Vidu paĝo 4)

GEFA-Senioren aufgepasst! – Wichtiger Termin –

Unser „Altentreffen" findet im Jahre 2005 vom **20. – 21. April**, (Mittwoch und Donnerstag), im schönen Städtchen **Gotha, in Thüringen,** statt. Als Tagungshotel haben wir das *„Waldbahn"*-Hotel ausgesucht. Das *Waldbahn*-Hotel ist vom Bahnhof aus gut zu Fuß zu erreichen. Es hat komfortable, schöne Zimmer, ausgestattet mit DU/WC, Fön, Telefon und Fernseher. Ein Doppelzimmer kostet 87,00 € und ein Einzelzimmer 59,00 €. Der Preis scheint auf dem ersten Blick etwas hoch, aber das sind voraussichtlich auch die einzigen Kosten für zwei ganze Tage, einschließlich Frühstück, zwei Mittagessen und ein Abendessen. Es lohnt sich!

Wir beginnen am Mittwoch, dem 20. April 2005, 13:00 Uhr, mit einem Mittagessen im Hotel, gehen anschließend spazieren oder suchen uns aus den vielen Möglichkeiten einen Ausflug aus. Am Abend sitzen wir wieder beim Abendessen zusammen und plaudern, bis uns die Müdigkeit überwältigt.

Am Donnerstag haben wir nach einem reichhaltigen Frühstück Zeit bis zum Mittagessen. Anschließend Abreise.

Da in Gotha immer Saison ist, haben wir schon jetzt drei Doppelzimmer und fünf Einzelzimmer reservieren müssen. Das bedeutet eine möglichst **frühe** Anmeldung. Darum entschließt euch bitte schon bis Ende des Jahres, spätestens bis Ende Februar 2005, ob ihr am Seniorentreffen teilnehmen möchtet oder nicht. Eine frühere Anreise oder einen längeren Aufenthalt sind auch möglich.

Anmeldung bitte einfach telefonisch, per Fax oder Post an **Rolf Terjung,** Finkenschlag 68, 47279 Duisburg, Telefon und Fax: 0203/72 40 95.

Bis in Gotha. (Rolf Terjung)





Pauzo dum ekskurso kun Anatoli Ionesov en Duisburg (la unua maldekstre)

La direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Anatol Ionesov, el Sarmakando en Uzbekistano, skribis al ni post sia reveno el Germanio, kie li ankaŭ vizitis nian Duisburgan Esperanto-grupon, inter aliaj jenan raporton pri Duisburg:

En la lando de fratoj Grimm: Esperanto kreas fontojn de Amikeco

„Ĉi tie (en Duisburg) kunfandiĝas du riveroj Rhein kaj Ruhr kaj troviĝas, la plej granda en la mondo, rivera haveno. La urbo aĝas pli ol 11 jarcentojn. Ĝi estas granda industria centro de Ruhra regiono. Malgraŭ tio, 40 procentojn de la urbo okupas ĝiaj *„verdaj pulmoj"* – arbaroj, grandaj ĝardenoj kaj lagoj. Min kore salutis la prezidanto de Duisburga E-klubo, kiu neniam disiĝas kun sia amiko – biciklo. Li faris perbicikle jam dekojn da long-distancaj vojaĝoj tra lando kaj Eŭropo trapansinte dekmilojn kilometrojn. Li rakontis al mi multon interesan pri siaj vojaĝoj al Ĉinio kaj enmanigis al mi multajn esperantaĵojn por nia muzea kolekto. Kune kun klubaj aktivuloj mi vizitis la ekpozicion de la muzeo de avangarda pentroarto „Küppersmühle", kie estas eksponataj la artoj de pluraj konataj germanaj pentristoj. Kaj mia gastiganto, ano de la klubo el apuda urbeto Moers, montris al mi ne nur lokajn vidindaĵojn, sed ankaŭ muzeon de abelbredado (li samtempe estas abelisto) kaj sian riĉegan kolekton de libroj kaj esperantaĵoj, kiu povus siatempe fariĝi bona bazo por fondi de Esperanto-muzeo."

Tio el sia vojaĝraporto pri Duisburg Rolf Terjung

Internacia renkontiĝo en Duisburg

„Ek al Duisburg" estis la titolo de la invitilo

Propradire, jam longe ekzistis tiu plano de reciproka vizito de Esperanto parolantoj el Nijmegen, Nederlando, el la Esperantogrupo Duisburg. Por esti sincera, la plano ankaŭ ne elpensis membroj el la Duisburga grupo, sed tiu ideo venis de anoj el la Krefelda. Laŭ rigora taksado ĝi estis ne internacia, sed „nur" du-urba, se vi Krefeld ankaŭ nombras, eĉ tri-urba renkontiĝo. Ankaŭ el Essen, Dortmund kaj Holzwickede venis Esperanto-parolantoj. Do, ĉu ĝi nun fakte vere estis „Internacia? Sed spite de tio, kunvenis en Duisburg pli ol dudek Esperanto parolantoj kaj ni renkontiĝis en tipa germana restoracio „Zum Alten Fritz". Kion ni faris tie? La ĉefpunkto ĝis posttagmezo estis la komuna tagmanĝo. kiu konsistis el (kompreneble) tipe germana, tre bongusta kaj speziale por ni kuirita manĝaĵo. Sed antaŭe ni havis tempon kaj ankaŭ eluzis ĝin por babili kaj prezenti interesan prelegon kun diapozitivoj pri la ĉijara UEA-kongreso en Pekino. (La tempo estis, kiel ĉiam, tro mallonga por rakonti ĉiujn novaĵojn kaj por babili pri aliaj homoj.)

Posttagmeze ni komune veturis per tramo al la intertempe renomita „Landschaftspark Nord" (pejzaĝ-parko norda) en Duisburg, kiu vere ne estas „parko", sed liberaera industri-muzeo de iama granda metalurgia uzino. Oni nomas tiun lokon „Landschaftspark", ĉar tie la naturo senĝene reprenas sian lokon inter tiuj iamaj fabrikhaloj kaj altfornoj. Intertempe kreskas tie multdiversaj plantoj - paradizo por botanikistoj.

Sed inter ni ne estis botanikistoj, minimume ne tiom spertaj, ke ili interesiĝis nur pri la novkreskintaj plantoj. Nin interesigis tiuj bone konservita altforno kaj fabrikhaloj, (se ne troviĝas en la proksimo vendejo por glaciaĵo). Sperta fakulo, kiu iam laboris tie, klarigis al ni detale la komplikan estiĝon de fero el erco per tiu altforno, sur kiu ni eĉ suprengrimpis. Tiel ni mem spertis, kial altforno nomiĝas altforno. De la pinto ni havis vastan elrigardon super la Ruhr-regiono. Denove sur la tero, ni vidis grandajn maŝinhalojn kun loko por pli ol mil spektantoj en kiuj hodiaŭ okazas ekpozicioj, teatraĵoj kaj eĉ sinfonikoncertoj.

Ĉu ni komprenis ĉion, kio iam okazis tie? La teknikon de ferproduktado certe nur supraĵe. Sed la vortojn kaj klarigojn de la gvidanto ni bone komprenis, ĉar nia grupmembro Lars tre lerte, flue, kaj kompetente tradukis eĉ la plej komplikajn terminojn en bonan Esperanton. Danke al li, ĉiu nun scias (minimume iomete), kiel oni faras feron el erco.

Estis ne perdita tago. Ĝis venontjare en Nijmegen. (Rolf Terjung)



Dum la ekskurso en "Landschaftspark Nord": Ĉu vi nun povas nomi Schlackenberg, Abstich aŭ Hochofen en Esperanto?

Kuraĝiga GEFA-jarkunveno

GEFA-prezidanto Rolf Terjung daŭrigis la tradicion kaj organizis en Gelsenkirchen la 48-an jarkunvenon de nia asocio. De la 8-a ĝis la 10-a de oktobro 2004 pli ol kvardek geamikoj volonte sekvis la inviton, inter ili gastoj el Belgio, Francio kaj Pollando. Ĉiu alveninto ricevis kun la aliaj dokumentoj rubandon de la Fervoja Sociala Organizaĵo (BSW) kun nomoŝildo.

Dum la laborkunsidoj la estraro kaj komitato de GEFA traktis kun la BSW-reprezentanto la nuntempan situacion kaj la agadon de GEFA. Vendredon vespere gaja rondo de la alvenintoj atenteme aŭskultis, kiam Rolf Terjung priskribis la transformiĝon de la iam industria urbo Gelsenkirchen al la hodiaŭa centro de servoj kaj sciencoj. Poste Czeslaw Baranowski raportis pri sia sukcesplena poresperanta agado en Pollando.

Sabaton antaŭtagmeze komenciĝis la duontaga ekskurso. Sur t.n. malpermesitaj vojoj rulis privata relaŭtobuso. Membroj de historia fervojasocio donis dum la veturado informojn, prospektojn kaj trinkaĵojn.

Reveninte al la hotelo atendis nin abunda bufedo. La gajeco kreskis, kiam Christoph Frank ĝojigis la spektantojn per sia parolanta pupo kaj per sia sorĉista prezentado. Specifa surprizo estis la tombolo kun gajnpremio por ĉiu. La sekvan parton de la vespero kantis kaj muzikis Stanislaw Stokrocki, same pola gasto, kaj verve li invitis per sia muziko la dancemulojn ĝis noktomezo.

Ankoraŭfoje oni koletiĝis dimanĉon matene por travivi per impresiga lumbildprelego fervojan vojaĝon de Peter Lohausen ekde Germanio tra Turkio al Irano. La partoprenintoj dankis al Rolf Terjung kaj al lia edzino pro la bonege aranĝita jarkunveno kaj promesis renkontiĝi en la norda insulo Sylt venontjare.

W.B.



100 Jahre Esperanto in Frankfurt (Main)

Am 30.10.2004 feierte die Esperanto-Gesellschaft Frankfurt ihr 100-jähriges Jubiläum im Gemeindehaus der kath. Pfarrei St. Antonius, Bettinastr. 28, Frankfurt (Main).

In der Festschrift führt Petra Roth, Oberbürgermeisterin von Frankfurt u.a. aus, dass Esperanto nicht nur eine Sprache ist, sondern ebenso eine multinationale Bürgerbewegung für kulturelle und sprachliche Gleichberechtigung.

Ähnlich weist Andreas Emmerich, Vorsitzender des Deutschen Esperanto-Bundes in seinem Grußwort darauf hin, dass die Esperanto-Gesellschaft Frankfurt mit Recht stolz auf ihre Leistungen in allen Bereichen sein kann und ermutigt, in gleicher Weise fortzufahren.

Auch Katarina Eckstädt, Vorsitzende der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt, berührt Höhen und Tiefen im Dasein der Jubel-Gesellschaft, weist auf Verbot und Terror während der Nazizeit hin, aber auch auf das Wiedererstehen und Weiterwirken im Sinne der Völkerverständigung nach dem 2. Weltkrieg.

Als Beauftragter für Esperanto in der Stiftung Bahn-Sozialwerk (BSW) Bereich Frankfurt und als Vorsitzender der Esperanto-Gruppe Frankfurt in der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung (GEFA) bedankte sich bei der Begrüßung Egon Kiefer vor allem für die jahrzehntelange Gastfreundschaft bei den mtl. Treffen und bei anderen Veranstaltungen. Er überreichte im Namen von GEFA und der Eisenbahner-Esperanto-Gruppe Frankfurt einen finanziellen Beitrag. Die o.g. Gruppe wirkte in der Vorbereitung und Durchführung des Festes auch tatkräftig mit.

Das Festprogramm wurde musikalisch begleitet vom Frankfurter Bläser-Trio und mit Liedvorträgen von Ralph Glomp, einem bekannten Esperanto-Sänger aus Hamburg.

Nach einem sprachlichen Überblick von Frau Dr. Alicja Sakaguchi folgte die Festansprache von Prof. Dr. Reinhard Selten, Nobelpreisträger und Ehrenmitglied der Esperanto-Gesellschaft mit dem Thema: „Europa und Esperanto", mit Ausführungen auf Gegebenheiten und Aussichten der internationalen Sprache. Resumee seines Vortrages: Estu realistoj kaj ekspektu la neeblan (seid Realisten und erwartet das Unmögliche).

Vorrangig wurde Carl Barthel mit anderen Gründungsmitgliedern (30.10.1904) ehrend gedacht.

Im Rahmen des Programms wurden Urkunden an die Ehrenmitglieder Elfriede Kruse, Wilhelm Kistenbrügger und Prof. Reinhard Selten überreicht. In der Festschrift berichtet Frau Kruse u.a. über ihre intensive und vielfältige Tätigkeit als Esperanto-Fachdelegierte Tourismus für Frankfurt über ihre Erlebnisse mit Gästen aus aller Welt.

Aus Mailand und Budapest, Partnerstädte von Frankfurt und auch aus Frankreich nahmen Delegationen am Fest teil.

Rezitationen, z.B. „Eisenbahnfahrt" von Erich Kästner (übersetzt vom verstorbenen Pastor Adolf Burkhardt) und eine Prosaerzählung eines rumänischen Schriftstellers (Original in Esperanto) „La inteligenta rumana azeno" – Der intelligente rumänische Esel, rundeten das Programm ab.

Eine Ausstellung von alten Dokumenten und Briefmarken mit Esperanto-Motiven bot einen übersichtlichen Einblick in die Esperanto-Kultur und -geschichte.
Der Esperanto-Buchdienst Dr. W. Schwanzer ermöglichte den Kauf von Esperanto-Büchern aus verschiedenen literarischen Bereichen.
Allen Helferinnen und Helfern des Festes gebührt Anerkennung und Dank! Wie schreibt Elfriede Kruse abschließend: „Esperanto hat mir die Türen zur Welt geöffnet, ich habe sympathische und interessante Menschen kennen gelernt und viele Freunde in der ganzen Welt gewonnen".

Egon Kiefer





Ekzistis iam ne nur iu rabisto Hotzenplotz...

...sed ankaŭ iu Hotzenplotza fervojo. Mirinde estas, ĝi ankoraŭ ekzistas hodiaŭ.
Kiam filatelistoj serĉis motivon por ornamkuverto okaze de speciala poŝtaĵtransporto per la plej malnova vaporlokomotivo en la mondo, kiu ankoraŭ estas funkcikapabla, ili trovis en la fervoja muzeo en Strasshof satirkarton pri la Hotzenplotza fervojlinio. Al tiu karto ankoraŭ apartenas poemo en la silezia dialekto, kiu bedaŭrinde ne estas tradukebla en la Esperanton. Por ŝatantoj de la silezia dialekto, vi nun povas legi tiun poemon:

Sahtich och dos Uangleck on,
Wie se etz nie wäter kon;
Aener thut met der Fohne wenka,
Weil de Sach etz thät stenka,
Aener will se heba nei –
s'Hasla setzt und lach derbei.

Schuster Jirga Honsa Huans
Staunt ond sähte; Ui, dar kuans!
Wie wird do mei Alde lacha,
Wenn se hiert sech neie Sacha,
Doß de Bohne kocht emsonst
Ihr de Ardäppel eim Donst.

Kiam Bohemio ankoraŭ estis aŭstra, tiu linio ligis la sileziajn vilaĝojn Röwersdorf kaj Hotzenplotz. Por la distanco de 20 km inter ambaŭ lokoj, la trajno bezonis pli ol unu horon!
Hodiaŭ la linio apartenas al la ĉeĥa ŝtatfervojo kaj la urbetoj nun nomiĝas Tremesna ve Slezku kaj Osoblaha. Por orientiĝi, la plej proksima, iom pli granda urbo estas Troppau.
Se vi nun havas la suspekton, ke temas nur pri „Tintfervojo" (germane „Bimmelbahn", aŭstre (Pimperlbahn") tiam vi pravas. Kiel vi vidas sur la foto, la „stacio" Hotzenplotz, ĝis hodiaŭ ne multe ŝanĝiĝis.
Tiu plej malnova lokomotivo en la mondo, kiu transportas tiujn apartajn poŝtaĵojn, troviĝas en la fervojmuzeo Strasshof, Aŭstrio. Ĝi nomiĝas LIACON.

Imagu

Imagu, vi estas patrino de filino kaj vi venas en ŝian ĉambron. Sur la lito kuŝas letero, vi malfermas ĝin kaj legas:

Kara panjo,
mi vere bedaŭras diri al vi, ke mi forlasis vin kune kun mia amiko. Li estas mia granda amato. Vi devus lin vidi! Li estas tiel aminda kun siaj tatuaĵoj kaj metalaj trapikaĵ-ornamoj. Sed plej bonege estas lia motorciklo! – Tamen, temas ne nur pri tio: Finfine mi gravediĝis, kaj Abdul diris, ke ni havos belan vivon en sia loĝveturilo, kiu troviĝas en la proksima arbaro. Li deziras havi multajn infanojn kun mi – kaj tio estas ankaŭ mia revo. Kaj ĉar mi konvikiĝis, ke marihuano vere bonas, ni kultivos ĝin ankaŭ por niaj amikoj, por helpi al ili, se ili suferas pro momenta manko de kokaino aŭ heroino. – Por la estonteco mi ankaŭ esperas, ke la medicina esplorado trovos rimedon kontraŭ aidoso, por ke Abdul fartu pli bone ol nun, ĉar tion li vere meritus.
Ne timu, kara panjo! Mi ja jam estas 13-jara kaj povas mem atenti pri mi. Sed mi esperas, ke mi baldaŭ povas viziti vin, por ke vi povu konatiĝi kun viaj nepoj.

Via amata filino.

P.S.: Estis nur sensencaĵo, panjo, kiun mi skribis. Mi estas ĉe la najbaroj! Mi nur volis diri al vi, ke ekzistas pli malagrablaj aferoj dum vivo ol la lerneja not-atesto, kiu troviĝas sur via apudlita ŝranketo.

Mi amas vin!





Am 26. Oktober 2004 fand in Aalen die Preisverleihung der FAME- und Mondo-Stifung statt, an der auch unser Regionalbeauftragter Siegfried Krüger teilnahm. Ausgezeichnet wurde die Gruppe Kajto (Flugdrachen) aus den Niederlanden, die begeisternd volkstümlich musiziert. Der Preis betrug 5000 €. Die vier Musiker reisen seit 1988 um die Welt. Die Band spielt und singt zu Texten von Dichtern aus vielen Ländern. Dabei haben sie auch ihre Liebe zu Esperanto und deren Nützlichkeit entdeckt. Sie sind nicht ausschließlich auf Esperanto fixiert, aber Esperanto ist ein Teil von ihnen und sie sind ein Teil von Esperanto.

Ihre neueste CD trägt den Titel: Lokomotivo, rulu nun! Die Lieder darauf heißen:

Fajfu, jen la Vivo!
Ĉuk – Tsch tsch,
Montaraj reloj,
Melankolia Trajnkanzono,
La Alarmobremso
Stacidoma Muzikanto
Stacidoma Tumulto
Mia propra Trajno
La Malluma Vagono
Rulu nun!
La trajnobsedato,
Atentu!

So richtig etwas für Eisenbahner und Eisenbahnfreunde!

Fervojaj novaĵoj

DB garantias al pasaĝeroj 20%-an rekompenson de la veturprezo, se ilia trajno malfruiĝas sur ĉeflinioj je pli ol unu horo. La rekompenso efektiviĝas nur per kreditbileto. Kaze de malfruiĝo en la kurtdistanca trafiko la DB kontraŭe, per kontraktoj kun la landaj provincoj, estas devigata damaĝkompensi la koncernan mandanton, sed ne pasaĝerojn.

DB ne maldungos fervojistojn ĝis 2008, se ili interkonsentos pri pli longa labortempo kaj se ili rezignos pri altigota salajro.

La Federacia Respubliko Germanio disponigas al la DB ĉiujara 2,5 miliardojn da eŭroj por la DB-reto.

Svisaj Federaciaj Fervojoj (SBB) atingis en 2003 profiton de 15,9 milionoj da eŭroj. La sumo rezultas precipe el ŝparitaj elspezoj por la fervoja personaro. En 2002 la koncerno havis perdon de 7,7 milionoj da eŭroj.

La ekspluatadon de la sudgermana fervojlinio Engen – Konstanz transprenos en 2006 la kompanio Eŭro-Turbo, kiu estas filio de la Svisaj Federaciaj Fervojoj (SBB).

Per interreto estas havebla aktuala fervojmapo de la DB pri la IC/ICE-reto.

DB pagos ekde 2005 al vojaĝagentejoj por vendotaj fervojbiletoj nur 2% el la enspezoj, nuntempe ankoraŭ 7%.

En la provinco Heslando la DB vendis depost 2001 30 stacidomojn. En Germanio la nombro de la ĝis nun venditaj stacidomoj estas 500. Disponeblaj estas ankoraŭ ĉirkaŭ 1800 stacidomoj sen funkcio.

DB ricevas 13% da sia trakcia kurento pere de suna, venta kaj akva energioj.

En la centralo Frankfurt (Main) 35 fervojistoj dirigas la fervojan DB-reton kun 2300 trajnoj ĉiutage.

DB intencas konstruigi en Berlin 150 metrojn altan turdomon apude de la Lehrter-stacio. Ekde 2010 laboros tie 6000 fervojistoj. Kostoj: 1,3 milionoj da eŭroj.

La nova plursistema DB-lokomotivo de la konstruserio 185 povas uzi por la movigo la diferencajn tensiojn de 15 kilovatoj / 16 2/3 Hertz kaj de 25 kilovatoj/50 Hertz. Ĝi estas uzebla en Francio, poste ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj kun 15 diversaj singalsistemoj.

La partopreno de la DB en la borsa merkato por 2006 estas intertempa prokrastita ĝis 2009.

Citaĵo de la DB-ĉefo Mehdorn: Ni estas la plej bona fervojo en Eŭropo, eble eĉ en la mondo. Mi ne komprenas, ke konstante oni kritikas nin.

(Elĉerpita el BAHNZEIT kaj Frankfurter Neue Presse de W.B.)

Nachruf

Lange Jahre war er Bezirksbeauftragter im Bezirk Koln. Wir kannten ihn als humorvollen Menschen, der sich durch seine immer gute Laune viele Freunde in vielen Landern geschaffen hat. Er war ein geschatzter und beliebter Mitarbeiter.

Esperanto hat er in den Jahren 1961/62 gelernt. Seinen erster IFEF-Kongress war der im Jahre 1961 in Barcelona. Seitdem haben wir gemeinsam viele Stunden und Tage bei unseren Tagungen und Kongressen verbracht.

Nun ist er nicht mehr. **Erhard Herlitze** starb am 12. Februar 2004, einen Tag nach seinem 80. Geburtstag. Wir trauern um ihn mit seiner Frau Hildegard und begleiteten seine Urne auf dem letzten Weg. Möge er im ewigen Frieden ruhen.

Erhard Herlitze wird immer in unserer Erinnerung bleiben. (Rolf Terjung)

Nachruf

Wie leider erst jetzt bekannt wurde, verstarb im Mai 2004 unser Mitglied Julie Winter im hohen Alter von 98 Jahren.

Im Namen der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt und der Deutschen Eisenbahner-Esperanto Vereinigung übermitteln wir den Hinterbliebenen unsere aufrichtige Anteilnahme. Wir danken posthum für die viele Jahre währende Treue und Mitwirkung im Interesse der Internationalen Sprache. (Egon Kiefer)



Benitan Kristnaskon
kaj
agrablajn festotagojn
al niaj gemembroj kaj ĉiuj niaj geamikoj.

Ni deziras por la jaro 2005
sanon, feliĉon kaj pacon en la mondo.

Por nia movado bonan progreson!

Redaktfino por FE 1/2005 estos la 15.02.2005
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: f-lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361